

Lingvo Internacia



Duonmonata gazeto

por

Esperanto

eliranta la 1-an kaj 15-an de ĉiu monato

~~~~~  
*XI-a Jaro*  
~~~~~

PARIS V°
PRESA ESPERANTISTA SOCIETO
33, Rue Lacépède, 33

ONI ABONAS L. I. ĉe:

a) oficejo de la gazeto en **Paris**, — b) S-ro *P. Ahlberg*, Sekretario de Klubo Esperantista, en **Stockholm**, (Svedlando), Döbelnsgatan 50, — c) S-ro *Manuel Benavente*, Sociedad 14, **Murcia**, (Hispanlando), — d) S-ro *K. Ostanievič*, «Kontoro Esperantista», en **S.-Peterburg** (Ruslando) Jaščik 80, — e) Societo «*Espero*» en **S.-Peterburg** (adr. D-ro *A. I. Asnes*, Bolšaja Podjačeskaja, d. 24. kv. 12), — f) Firma *Möller & Borel*, Prinzenstrasse 95, **Berlin S.** (Germanlando), — g) Firma *J. Lindauer'sche Buchhandlung (Schöpping)*, Kaufingerstrasse 29, **München** (Bavarujo). — Oni sendu abonmonon nur al unu el tiuj ĉi sinjoroj resp. firmoj, aŭ al redakcioj de gazetoj aŭ sekretarioj de grupoj esperantistaj.

Jara abono: sen literatura aldono **5 frankoj**, kiun sumon oni sendu laŭeble per poŝta mandato. (Por papermonoj ni kalkulas: 5 frankoj = 2 rubloj = 4 germ. markoj = 4 ŝilingoj = 1 dolaro = 2,50 hol. floreno = 4 skand. kronoj = 5 aŭstro-hungaraj kronoj.) — Kun literatura aldono **7,50 fr.**

Prezo de ĉiu numero 40 centimoj; numero de la greso: 60 centimoj.

Pago por anoncoj: 40 centimoj por linio (kompostita el «p. literoj»); ĉe pli granda anoncado estas donata rabato laŭ reciproka Malgrandajn nekomercajn anoncojn ni presas por niaj abonantoj po 10 centimoj por linio. Rabato por almenaŭ ses presoj: 10 %.

La ŝanĝo de adreso kostas 50 centimojn.

Poŝtmarkoj estas akceptataj nur por $\frac{3}{4}$ de ilia



LA INTERNACIA TRINKAĴO

Viskio Esperanto

Registered trade mark
N° 270,042

Marque déposée
N° 13,195

Registered label N° 272,434

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la nomon **Esperanto** sur la afiŝeto, kiu estas desegnita kiel propagandilo.

BUCHANAN, SCOTT & Co.

Garthland street,

GLASGOW (Skotlando).

Telegrafa adreso: Esperanto Glasgow.



Hjalmar Bäckström, Saltsjöbaden, proksimé Stockholm, Svedujo, ricevas ĉiuspecajn komercajn komisionojn.



INTERNACIA SIGNO

aprobita de grupoj kaj societoj en Kanad-, Anglo-, Belg-, Franc-, German-, Hispan-, Aŭstro-, Fin-, Itallando, Siberio k. a. rekomendata de S. F. p. p. E., butontrua, broĉa, kravata, ricevebla ĉe ĉiuj Grupoj Esperantistaj : 1 franko. — Rabato al la grupoj por almenaŭ 12 : 20 % . — Sin turni al S-ro

Emile P. GASSE, 105, Lycée, Le Havre, Franclando.

S-ro PIERRE DÉRIBÉRE-DESGARDES, medicina kaj sciencia studento, 76, rue des Saints-Pères, Paris, interesiĝante pri medicino, botaniko kaj fitoterapio, deziras korespondadi pri tio.

Esperanta oficisto bezonata.

La Esperanta eldonejo
MÖLLER & BOREL, BERLIN, Prinzenstrasse 95

deziras **oficiston-kunlaboranton**. Perfekta kono de Esperanto necesa ; kono de germana lingvo dezirinda. Salajro laŭ la cirkonstancoj. — Skribu al la ĉi supra adreso.



ELDONOJ

DE LA

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

(akcia societo
de diverslandaj Esperantistoj)

PARIS, 5^e
33, rue Lacépède, 33.

La dekstraj pli nigraj prezoj entenas la sendelspezojn.

Esperanta Sintakso, laŭ verkoj de D-ro Zamenhof kaj aliaj aŭtoroj. Tute verkita en Esperanto, de P. FRUICIER. Klarigas aparte la uzadon de l'artikolo, verbo, participoj, tempoj kaj modoj, prepozicioj, ktp. Ebligas rapide akiri bonan stilon en Esperanto.

1 fr. 50. — 1 fr. 60.

Esperanta Versifrado, de Th. CART kaj PARISOT. Klarigas per ekzemploj tiritaj el la Esperanta literaturo, kiamaniere D-ro Zamenhof kaj la plej lertaj poetoj esperantistaj ritmigus siajn verkojn. Gvidilo por ĝuadi la ĉarmon de la esperantaj versaĵoj. 30 cent. — 35 cent.

Frazlibro de l'Turisto, 400 utilaj frazoj en Esperanto por la vojaĝo kaj ĉiutaga vivo kun tradukoj angla, franca, germana, hispana kaj itala ; resumo de la esperanta gramatiko en kvin lingvoj ; adresaro de grupoj esperantistaj en la tuta mondo, k. a. ; nova eldono (3-a), en presado.

(Daŭrigo sur la sekvanta paĝo)

ELDONOJ DE LA
Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris
(Daŭrigo)

Kurloza Sunhorlogo, de S. POLJANSKIJ. Montras, kiel oni povas facile konstrui praktikan sunhorlogon en ĉiuj lokoj sur la tero; kvar desegnaĵoj kaj tabeloj klarigas la tekston; *2-a eldono.*

20 cent. — 25 cent.

Trafendita Turo, originala versaĵo en Esperanto kun franca traduko de TH. CART. Luksa broŝureto, vendata por la propagando inter blinduloj.

25 cent. — 30 cent.

Ĉu la lingvo internacia povas esti la latina? Artikoloj tiritaj el *L'Espérantiste*, france kaj esperante verkitaj de L. DE BEAUFONT; enhavas ĉiujn argumentojn kaj rebatojn pri la akcepto de latina lingvo kiel internacia; ebligas facile rebati la tiel ofte faratajn kontraŭdirojn.

60 cent. — 70 cent.

Perdita kaj Retrovita, originala legendo en Esperanto verkita de E. BOIRAC, rektoro de la Dijona Universitato.

60 cent. — 65 cent.

Edziĝo Kontraŭvola, unuakta komedio de MOLIERE, tradukita de V. DUFEUTREL; — ludita en la Kongreso en Boulogne-sur-Mer:

60 cent. — 70 cent.

Homa Doloro, poemo originale verkita de FEZ.

30 cent. — 35 cent.

Paŭlo kaj Virginio, de BERNARDIN-DE-SAINT-PIERRE, tradukita de H. HODLER.

1 fr. 25. — 1 fr. 45.

Ruĝa Floro, rakonto de V. GARŠIN, tradukita de K. BOGUSEVIČ.

30 cent. — 35 cent.

Sep Rakontoj, originale verkitaj en Esperanto, de IVAN MALFELIČULO.

1 fr. — 1 fr. 15.

Rolandkanto (*Chanson de Roland*), tradukita en Esperantaj versoj, de D-ro NOEL.

1 fr. 50. — 1 fr. 70.

Grasa lignaĵisto, tradukita el itala lingvo, de G. CHAVET.

50 cent. — 55 cent.

Elementa fotografa Optiko, de KARLO VERKS. Tiu verko montras kaj difinas la diversajn esprimojn teknikajn, kiuj estas kutime uzataj en fotografa optiko; — 1 broŝuro 12 × 19 cm. da 80 paĝoj kun klarigaj ilustraĵoj.

1 fr. 25. — 1 fr. 40.

Oficiala protokolaro de la Unua Kongreso Universala de Esperanto en Boulogne-sur-Mer

30 cent. — 35 cent.

Esperanta Radikaro, de TH. CART, por blinduloj kaj neblinduloj. Entenas sen ia traduko la radikojn, kiuj troviĝas en niaj diversaj vortaroj. Tre oportuna libreto por lerni radikojn.

60 cent. — 65 cent.

Instruado de Esperanto per bildaro, broŝureto kun ilustraĵoj, por ekzercoj de interparolado.

25 cent. — 30 cent.

La Benkoj de la promenejo, de J. JOUY, tradukita de P. CORRET, Amuza tedmonologo.

20 cent. — 25 cent.

Mallumaĵoj, rakonto, de ABONYI ÁRPÁD, — tradukita el la hungara lingvo de LENGVEL PÁL.

60 cent. — 70 cent.

Les Mots Esperanto groupés selon le sens, par MARCEL BOBIN. 1 vol. 11 × 17 cm. de 130 pages.

1 fr. 25 — 1 fr. 35

Notions élémentaires d'Esperanto et Exercices de Conversation, par TH. CART. — Vendu au profit de la propagande parmi les aveugles. — Deux fascicules.

25 cent. — 35 cent.

AVIZO GRAVA. — Ni petas niajn klientojn, ke ili volu aldoni por la abonoj al gazetoj aliaj ol « Lingvo Internacia » kaj « Juna Esperantisto », po 10 centimoj.

La poŝtmandatoj devas esti adresataj **ne** persone, sed al la **Presa Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, Parizo.**

Se nomo de poŝtoŭicejo por la pagejo estas bezonata, oni donu « **Bureau de poste N° 29, Rue Monge, Paris** ». Ni al-tiras specialé sur tiun gravan punkton la atenton de niaj klientoj anglaj kaj amerikaj; sen tiu sciigo, ni havas multajn mal-facilaĵojn por enspezi tiujn mandatojn.

Lingvo Internacia

Duonmonata organo en Esperanto

Redakcio kaj administracio : PARIS, 5-e Arr., 33, rue Lacépède, 33

1 junio 1906

Georges Renard : Strikoj kaj arbitraco (trad. Dr ^e NOEL).	305
Victor Hugo : Historio de Cosette (trad. PAUL BOULET) .	310
Miksaĵoj Prof. Vorobjev. — Poŝtkartoj ilustritaj. — Novaĵo por blinduloj. — Kontraŭ absinto. — Por la Lapoj. — Oni parolas fremdlingve. — Japanaj Proverboj. — Bagateloj.	316
Paul Champion : Terkultura kalendaro (junio).	320
René Deshays : Ujo, Arbo, Lando, gramatika versaĵo .	324

Tra la mondo Esperantista :

G. Queste : Modo ordona en dependaj propozicioj . .	325
Diversaĵoj : La Sankta Biblio Esperante. — Pri la Geneva Kongreso. — Ankoraŭ pri Dilpok. — Laste aperintaj verkoj. — Kelkaj vortoj de la Redaktoro. — Nova ĵurnalo Esperanta . .	333

Nia aldono literatura (paĝoj 161-176) : **La Festo de la Renaskiĝo**, de V. DOROŜEVIČ (Trad. I. SIRJAEV) (*fino*), kaj **La Reviginta kanto**, de V. DANĈENKO (trad. W. ERDMANN), *komenco*.

Strikoj kaj Arbitraco

La striko, ĉu laborista ĉu mastra (kiun oni nomas la *lock out*) ne estas io alia ol decidita batalo inter la dungintoj kaj la dungitoj. Sekve, kaj same kiel en ĉiuj bataloj, fariĝas grandegaj perdoj, kruelaj suferoj, reciprokaj perfortoj, malordoj, kiuj necesigas intervenon de la nacia militistaro, kies laboro estas certe pli prave alia.

Kiu do el la batalantoj fine restas la venkinto? Tiu ja,

(1) Ni enpresas tie ĉi *dokumente* tiun artikolon, kiu montras interesantan flankon de lando fame konata kiel unu el la plej demokratiaj. — R. d. l. R.

kiu povas pli longtempe kontraŭstari al la bankroto aŭ al la malsato. La fina decida vorto apartenas al la diro de tiu, kiu estas la pli forta. La malpaco estas ne solvita sed disigita, kaj tuj de la morgaŭa tago, venkintoj kaj venkitoj restas, unuj apud la aliaj, kun malamikaj sentoj en la koro.

Vere, same kiel oni jam provis krei inter la popoloj kortumojn interkonsentigajn kaj arbitraciajn, ĉu de nun estas iu ajn motivo, por ke oni ne penadu kiel eble plej efike por krei kortumojn tiajn inter du kategorioj de samnaciaj produktistoj, ĉiufoje kiam iliaj gajnoj samtempe kunrilatiĝantaj kaj diferencaj, metas ilin en tiel senindulgan malkonsentiĝon?

La partoprenantoj, kiujn oni klare vidas tiel batali, ne estas la solaj interesatoj je la demando. Ankaŭ la publiko malprofitas je tio, kaj tio donas al la Landa Societo rajton por interveni; ĉu ŝtato ne estas natura arbitraciisto inter siaj civitanoj, kiam malkonsento disigas ilin; ĉu ĝi povas permesi, ke la kontraŭantaj partoj agu mem por siaj rajtoj, je siaj propraj riskoj kaj danĝerigo, kaj spite malprofito al la tuta komuna societo?

La demando staras en ĉiuj landoj, sed pri ĝi, jam firme respondis nur malmulte da ili. Forflugu per la penso ĝis lokoj ĉirkaŭkuŝantaj ĉe la antipodoj. Tiuj ĉi ne estas malproksimaj de ni, ĉar vere, tute mirinde mallongigis la teron la facileco de la perveturaj interrilatoj. Ni reprezentu al ni, ke ni estas en Nov-Zealand, unu el tiuj anglosaksaj landoj, kie civitanoj posedas famon rifuzi al la ŝtato rajton por troa aŭtoritato.

Nu, tion, kio fariĝas en tiuj ĉi cirkonstancoj ni ekscios dank' al tre precizaj informoj el tie raportitaj de S-roj Metin kaj Negaro, du junaj scienculoj, kiuj pro monhelpado de malavara donacinto, ricevis eblon fari tra la mondo fruktoplenan esploradan vojaĝon.

Tie ekzistas leĝo farita en jaro 1894a kaj jam plibonigita post tiu epoko; ĝi havas tute celomontrantan titolon: *Leĝo por instigi al la ekformo de industriaj asociacioj (legu « sindikatoj ») kaj por faciligi la pacigon en industriaj konfliktoj, per interkonsentiĝo kaj arbitraco.*

Rimarku tion ĉi. La leĝo ne sole permesas, ĝi konsilas por la ekformo de sindikatoj. En Eŭropo oni ne vidis ion similan, se ne en la tempo, kiam la franca Provizora Registaro proklamis per dekreto de la 25^a de Februaro, en jaro 1848^a, ke la

laboristoj « *devas* societigi inter si, por eltiri profiton de sia laboro. » La supredirita leĝo devenas de tio, ke, en Nov-Zealando, la ŝtato konsideras sindikaton kiel reguligan organon, necesan por bona organizo de la laborado. Mi eble estis malprava, kiam mi diris, ke Nova Zealando ne estas malproksima de Francujo.

Kio ajn estas pri tio, la ŝtato ne sole proponas sed trudas siajn servojn por fini la konfliktojn. Tiuj ĉi devas esti elmetataj antaŭ *konsentiga konsilantaro*, kiu estas ĉu regiona, ĉu loka. Sub ĝia arbitraco ne estas la izolita laboristo, kiu povas striki mem aŭ esti eksigita en plena sendependeco de iu ajn. Sed dependas de ĝi ia ajn sindikato da laboristoj, eĉ konsistanta nur el sep membroj, kaj ankaŭ iu ajn dunginto.

Dunginton eĉ izolitan oni konsideras, laŭ la esprimo de mi ne scias kiu ekonomiisto, kiel homon, kiu konsistigas de si mem konstantan asociacion. Li ne povas forkuri de la oficiala interjuĝo, eĉ se li ne dungis sindikatanojn, kaj tiamaniere li ne povas cedi al tento eksigi dungitojn, kiuj partoprenus en sindikato.

La *Konsentiga konsilantaro* (same kiel komerca konsilantaro), konsistas el membroj poduone elektitaj de la dungintoj, kaj poduone, de la laboristoj (tamen la izolitaj laboristoj ne partoprenas en voĉdonadoj); ĝi klopodas por amike solvi la malkonsenton; se ĝi malsukcesis, ĝi faras raporton, kaj l'afero transmetigas al la *Centra kortumo de arbitraco*.

Tiu ĉi konsistas el tri membroj: unu nomita de la laboristaj sindikatoj, unu de la mastraj sindikatoj, fine, tria persono, la efektiva arbitraciisto, riprezentanta la ŝtaton kaj nomita de la ŝtatoregistararo. Li estas juĝisto de la Altega Juĝistararo. Oni vidas, kiel grandpova estas tiu ĉi juĝisto. Sed mi ne scias kiamaniere li ricevis tiun altan rangon, kie li sidas, ĉu li estas nomita de la reganta potenco, aŭ ĉu li estas elektita de la du ĉambroj, kiel tio fariĝas en Svisujo.

Tiu *arbitracia kortumo* starigas firman decidon, kies daŭro ne preterpasas du jarojn, sed kiu estas ofte renovigita pro konsentigo inter la du partioj. La sankcio, post malobeo pri tiu ĉi decido, konsistas el monpuno jam sufiĉe grava se ĝi tuŝas privatan homon, kaj ankoraŭ pli grava se ĝi tuŝas asociacion. La juĝaj elspezoj estas plej grandparte pagitaj de la ŝtato mem.

La povo de tiu ĉi kortumo estas granda; ĝi decidas pri la tri punktoj kiuj ordinare estas la fundamenta kaŭzo de la malkonsento; t.e.: nombro de la metiolernantoj, daŭro de la laborado, kiomo de la salajroj; ĝi povas ordoni ke oni montru al ĝi la registrilibrojn de la fabrikistoj por taksi ĉu iliaj profitoj ebligas, ke ili pli altigu la salajron por la manfarado; ĝi ne entreprenas proporciigi la salajron kun la profitoj, kaj tiamaniere starigi kvazaŭan preztabelon ŝanĝeblan, kiu ekzistas preskaŭ nur pri la mineja laborado; sed ĝi volonte kalkulas la realigitajn profitojn por la starigo de la tarifo.

Kiamaniere funkciadis tiu ĉi leĝo? Fakte, ĝi forigis la laboristajn kaj mastrajn strikojn. La unuaj fariĝis eblaj nur al laboristoj ne sindikatiĝintaj.

Kiamaniere estis akceptita tiu ĉi leĝo? En la komenco, plendis la dungintoj, ke ĝi pli multigas la konfliktojn. La alvokoj al la kortumo, vere, estis multenombraj, sed ĉiuj ricevis pacigajn solvojn, kaj tio estas ja rezultato sufiĉe ŝatinda. Post dek-jara eksperimentado, ŝajnas, ke la mastroj akomodigis kun tiu stato de la aferoj, kiu faras iliajn profitojn malpli grandaj, sed kiu, kompanse, ebligas por la produktado regulecon tute rimarkindan. Oni ne vidas, ke ili konsideris la situacion de la laboristoj tiel ĵaluze, ke ili dezirus fariĝi mem laboristoj.

Aliflanke, la laboristoj timas ion domaĝigan. Ili malkviete konjektas, ke en okazo de krizo (malpliigo en produktado) ilian salajron malgrandigos la kortumo. Sed ĉu la situacio estus malsama eĉ se la kortumo ne ekzistus? Atendante do, ili tiras profiton el ĝiaj decidoj, ili akceptas la oficialan intervenon; kaj eĉ la sindikataj sekretarioj (kiuj tie partoprenas en zorgo por kontroli la laboradon), opinias, ke estas pli bone, se ili ne plenumas solaj sian kontrolon, kaj se troviĝas ĉe ilia flanko ŝtataj oficistoj por pligrandigi ilian aŭtoritaton.

Resume, per tiu nova laborkodekso, la laboristoj profite akiris la rajtigon de la opa laboristokontrakto, la starigon de ne malgrandigebla minimumo salajra, kaj daŭron da okhora tago, aŭ pli ĝuste da kvardekokhora semajno. Plie la sindikato ne nur altiras al si la laboristojn pro la leĝaj profitoj, kiujn al ili ĝi prezentas, sed ĝi havas nenion por timi de la kontraŭago de la « flava sindikato ». Tuj kiam ĝi estas formita kaj registrita, ĝi fariĝas la parolanto en nomo de la metjogildo kaj ĝia regula reprezentanto en balotoj ĉe la konsentiga konsilantaro kaj ĉe

la *arbitracia kortumo*. Tial oni, ne devas miri, ke la plimulto en la laborista klaso kontente profitas je la atingitaj rezultatoj.

Sed, kio farigas pri la laboristoj dungitaj de la ŝtato? Kia estas ilia situacio? En la komenco ili estis nerajtigataj por ricevi la profitojn el la leĝo. Mastro-ŝtato ne akceptis diskuti kun siaj oficistoj. Tamen tiu escepto foriĝis.

Tiel, la fervojaj oficistoj (kiuj estas tie naciigitaj) povas elkonigi la *arbitracian kortumon* pri ĉiu grava konflikto naskiĝinta inter ili kaj ilia hierarkia ĉefo. En tiu okazo, la ministro ludas rolon de mastro. Li devas fari enketon, kaj la *arbitracia kortumo* (en kiu la oficista sindikato partoprenas por elekti la laboristan delegiton) plej regeme decidas pri la malkonsentiga demando.

Eble, tio ŝajnos al ni stranga pro nia al kutimiĝo al la monarĥia administracio, kiun oni ankoraŭ uzadas en nia maljuna Eŭropo. Estas tamen necese diri, ke la devigata arbitracio estas pravigita kiel taŭga pli ankoraŭ por la publikaj laboraĵoj ol por la privata industrio. Tio estas tute vera, ĉar kiam la afero koncernas tiun ĉi lastan, granda malfacileco prezentigas por fari juĝon, kiu povas esti bona en unu regiono de la lando, malbona en alia, en kiu la vivpostuloj ne estas plu la samaj; kaj tiamaniere la juĝo povas meti la mastrojn en staton de malplipoveco, kompare kun aliaj naciaj aŭ fremdaj konkurantoj. Nu, tiu malfacileco malaperas, tuj kiam la afero koncernas ŝtatan industrion. La ŝtato ja, kiu posedas monopolon pri ĝi, neniel riskas renkontiĝi kun konkuranto.

Georges RENARD.

Trad. Dr NOEL.

Tro da verdiremo. — Malriĉa poeto time eniras en la direktoran oficejon de granda revuo.

La direktoro estas skribanta, kaj, ne rigardante la vizitanton :

— Kion vi deziras? li diras.

— Jen estas kelkaj versaĵoj, kiujn mi alportas al vi kaj kiujn....

— Bone, bone, respondas la direktoro; mi nun estas tre okupata; volu esti sufiĉe kompleza por enĵeti mem ilin en la fajrejon!...

HISTORIO DE COSETTE

Amike dediĉita al Sinjoro Michaux,
de Boulogne-sur-Mer.

En Montfermeil, apud Paris, loĝis drinkejmastro, nomita Thenardier. Li estis viro ĉirkaŭ kvindek-jara, malgranda, malgrasa, ŝajnante fripona kaj hipokrita. Lia edzino, kontraŭe, estis blonda, granda, grasa kaj havis barbaĵon.

Ili havis tri infanojn : du filinojn kaj unu filon.

Krom tio, ili loĝigis ĉe si malgrandan knabinon kies nomo estis Cosette ; ŝi estis ok-jara, tute malgranda, pala ; ŝi ŝajnis malfeliĉa.

La geedzoj Thenardier similigis ŝin la servistino, kaj, efektive, ŝi faris la tutan laboron.

Kial ŝi estis tie ?

Iam, ŝia patrino, ne povante ŝin varti kaj eduki, komisiis ŝin al nutristino ; ŝi pagis la pension regule, kaj dum tiu tempo, Cosette estis preskaŭ bone zorgata. Sed, ian tagon, la patrino de Cosette mortis, la mono ne plu venis.

La geedzoj Thenardier, furiozaj, ekbatis la malgrandulinon.

Foje, kvar vojaĝantoj alvenis en la gastejon. Cosette estis sidiĝinta en angulo, kaj pensis malgaje. Subite, unu el la viroj diris :

— Oni ne donis trinkaĵon al mia ĉevalo !

Cosette ektremis, ĉar ne estis plu akvo. Ordinare, ŝi iris ĉerpi ĝin malproksimen, malproksimegen, per granda peza sitelo. Tiun vesperon, la nokto estis tute nigra. Tio estis ankoraŭ pli teruriga.

— Jes, respondis sinjorino Thenardier, ĝi trinkis.

— Ne, respondis la vendisto, kolere, mi tion facile vidas !

— Se tiu besto ne trinkis, diris sinjorino Thenardier, ĝi devas trinki ! Cosette !... Kie vi estas ?

Sub la tablon ŝi kliniĝis, kaj trovis la knabinon :

— Portu trinkaĵon al tiu ĉevalo !

— Sed, Sinjorino, diris kviete Cosette, akvo nun mankas tute.

— Nu, iru tuj ĉerpi iom da ĝi !

Cosette mallevis la kapon kaj prenis malplenan sitelon kiu estis apud la kamento.

Tiu sitelo estis pli granda ol ŝi: la knabino estus povinta sidiĝi internen kaj resti sene.

— Prenu, bufineto, diris sinjorino Thenardier; revenante, vi aĉetos dikan panon ĉe la panisto. Jen sepdek kvin centimoj.

Cosette metis la monon en sian poŝon kaj eliris.

Sur la alia flanko de la strato estis foiro. La butikoj, bone lumigataj, rekuraĝigis Cosette dum unu momento; ŝi alproksimiĝis kaj vidis grandegan pupon, vestitan per rozkolora robo, kun oraj spikoj sur la kapo, veraj haroj kaj bluaj okuloj.

Cosette haltis, mirigata. Neniam ŝi estis vidinta tiel belan pupon, eĉ songante; ŝi restis tie, admiregante, kiam subite la akra voĉo de sinjorino Thenardier kriis:

— Nu! petolulino, vi ne estas foririnta? Atendu iom!

Kaj Cosette forkuris, kunportante la sitelon, kaj faris la plej grandajn paŝojn, kiujn ŝi kapablis.

Cosette ne rigardis plu eĉ unu butikon. Baldaŭ, cetere, ŝi preteriris la lastan, kaj troviĝis en densa senlumajo. Tiam, ŝi ektimis.

Tamen estis ankoraŭ domoj. Oni ekvidis iom da lumo tra la fenestroj. Sed, kiam la lasta domo malaperis, ŝi haltis. Antaŭ si ŝi vidis nur grandan nigran truon! Tiam, ŝi reprenis sian sitelon.

— Nu! ŝi diris, mi diros, ke ne estis plu akvo!

Al la urbo ŝi revenis. Apenaŭ ŝi estis farinta kelkajn paŝojn, kiam ŝi haltis.

Sinjorino Thenardier timiĝis ŝin ankoraŭ pli multe ol la nokto, kaj ŝi returneniris al la akvofonto.

Tiu ĉi estis en arbaro.... La arbaron ŝi eniris, kurante, nenion rigardante, nenion aŭskultante; ŝi ekploris...

Fine, ŝi alvenis al la fonto, subakvigis sian sitelon, kaj elprenis ĝin preskaŭ plenan. Dum ŝi alkliniĝis, la moneroj falis, kaj ŝi ne vidis tion.

Tuj ŝi volis returneniri, sed ŝi estis lacega: ŝi devis sidiĝi. La arboj staris ĉirkaŭ ŝi, kaj ŝajnis al ŝi kvazaŭ fantomoj; ŝi timis denove, pli multe ankoraŭ ol antaŭe. Tiam, ŝi leviĝis.

Ŝi volis foriri, kuri ĝis la domoj, sed la sitelo estis tro peza; ŝi povis nur fari dekduon da paŝoj kaj ree devis ripozi.

Poste, ŝi rekomencis kaj haltis ankoraŭ ; ŝi pensis, ke la returnenirado ĝis la domo daŭros almenaŭ unu horon kaj ke eble sinjorino Thenardier batos ŝin. Tiam, ŝi sidiĝis, malesperante...

Subite, mano prenis la tenilon de la sitelo kaj levis ĝin. La kapon ŝi levis. Viro staris antaŭ ŝi.

La knabino ne timis.

— Donu, diris la viro, mi volas porti ĝin !

Cosette ellasis la sitelon. La viro ekmarŝis apud ŝi. Poste, li aldonis :

— Malgrandulino, kian aĝon vi havas ?

— Mi estas ok jara, Sinjoro.

— Ĉu vi iras malproksimen ?

— Je unu kvarono da horo, de tie ĉi .

La viro restis dum unu momento senparole, poste li subite diris :

— Vi do ne havas patrinon ?

— Mi ne scias, respondis la knabino, mi ne kredas. La aliaj havas patrinojn. Mi...; mi ne havas... Mi kredas, ke neniam mi havis...

— Kiu estas via nomo ? diris la viro.

— Cosette,

La viro ektremis. Li rigardis ŝin, poste li demandis :

— Kie vi loĝas ?

— En Montfermeil.

— Kiu do sendis vin, je tiu ĉi horo, por serĉi akvon en a arbaro ?

— Sinjorino Thenardier ?

— Kion ŝi faras, sinjorino Thenardier ?

— La mastrino de la gastejo ŝi estas, diris la knabino.

— Nu, mi tuj iros loĝi tie, hodiaŭ nokte.

Kelkaj minutoj forpasis. La viro daŭrigis :

— Ĉu sinjorino Thenardier ne havas servistinojn ?

— Ne, sinjoro.

— Ĉu vi estas sola ?

— Jes, sinjoro. Sed, ankoraŭ estas du knabinoj, la filinoj de sinjorino Thenardier.

— Kaj kion ili faras, tiuj knabinoj ?

— O ! diris la infanino, ili havas belajn pupojn, objektojn kun oraĵoj. Ili ludas, ili amuziĝas...

— Dum la tuta tago?

— Jes, sinjoro.

— Kaj vi?

— Mi, ... mi laboras..

— Dum la tuta tago?

— Jes, sinjoro.

Ili atingis la vilaĝon, poste la foiron, poste la gastejon.

— Sinjoro, diris Cosette, timema, ĉu vi volas permesi ke mi nun reprenu la sitelon?

— Kial?

— Tial ke, se sinjorino Thenardier vidos, ke oni portis ĝin, ŝi batos min.

La viro redonis al ŝi la sitelon. Ili frapis sur la pordon. Sinjorino Thenardier aperis kun kandelo en mano.

— Ha jen vi alvenas, sentaŭgulinol....

— Sinjorino, diris Cosette, tremante, jen estas viro, kiu deziras tien ĉi loĝi.

Rapide, afabla rideto aperis sur la malgajan mienon de Sinjorino Thenardier. La viro ŝi rigardis : li ŝajnis malriĉa. Tial, ŝi diris :

— Eniru, viro!

La viro sidiĝis kaj ekrigardis Cosette kun stranga atento; ŝi estis vestita de ĉifonaĵoj, kaj malsekigita; ŝi ne kuraĝis iri por sekigi apud la fajron; ŝi tremis pro malvarmo kaj pro timo.

Subite, sinjorino Thenardier ekkriis :

— Sed, mi forgesas... kaj la pano?

Cosette estis tute forgesinta ĝin; ĉar ŝi timis, ŝi mensogis :

— Sinjorino, la panistbutiko estis ŝlosita.

— Mi scios morgaŭ ĉu tio estas vera, diris sinjorino Thenardier, kaj se vi mensogas, vi estos batata. Atendante, redonu al mi la sepdek kvin centimojn.

Cosette metis la manon en sian poŝon. La mono ne estis plu tie. Ŝi ne kuraĝis diri eĉ unu vorton.

— Ĉu vi ĝin perdis? kriis sinjorino Thenardier, aŭ ĉu vi volas ŝteli min?.

Samtempe, ŝi prenis frapilon kiu estis pendigita kontraŭ la muro.

Dume, la viro kiu estis helpinta Cosette, serĉis en sia poŝo. Poste, li malleviĝis kaj diris :

— Atendu, sinjorino, mi vidis fali ion de la antaŭtuko de tiu malgrandulino; estas sendube tio.

Kaj li donis moneron al sinjorino Thenardier kiu prenis ĝin ĉar ŝi gajnis ne dirante ke ŝi estis doninta nur sepdek kvin centimojn al Cosette.

Tiam, la filinetoj de la geedzoj Thenardier eniris. Ili havis en la brakoj belajn pupojn kaj ekludis. Cosette sidiĝis en angulon kaj trikis.

— Kion ŝi do faras? diris la nekonatulo.

— Ŝtrumpojn por miaj filinoj, respondis sinjorino Thenardier.

— Kiom valoras tiu paro da ŝtrumpoj?

— Almenaŭ unu frankon kaj duonon.

— Ĉu vi donus ĝin por kvin frankoj?

Sinjorino Thenardier ekridegis.

— Mi volus bone, ŝi diris.

— Mi aĉetas tiun paron da ŝtrumpoj; jen kvin frankoj, respondis la viro.

Poste, li turniĝis al Cosette :

— Nun, vi povas ludi, mia infanino.

La geedzoj Thenardier estis miregataj. Cosette forlasis sian trikaĵon. Ŝi vidis ke la filinoj estis forlasintaj la pupojn ; ŝi kviete alproksimiĝis, prenis unu el ili, kaj ĵulis ĝin. Ŝi ŝajnis feliĉa : neniam ŝi havis pupon !

— Cosette, kriis subite sinjorino Thenardier, kiu estis ĵus ekvidinta tion.

Cosette returniĝis, kaj kviete demetis la pupon. Poste, ŝi ekploris.

— Kio okazas? diris la nekonatulo.

— Ŝi kuraĝis tuŝi la pupojn de miaj filinoj per malpuraj manoj.

— Tiom da bruo pro tio! diris la viro; kaj, eĉ se ŝi ludus kun tiu pupo?...

Li iris al la pordo de la strato, malfermis ĝin kaj eliris.

Sinjorino Thenardier profitis tion por frapegi per piedo Cosette kies ploregaĵoj obligis.

La pordo remalfermiĝis. La viro reaperis. Li tenis en siaj manoj la belan pupon kiun Cosette estis admirinta multe, kaj li diris :

— Prenu, ĝi estas por vi.

Cosette rigardis ne kuraĝante ĝin preni.

— Li certe estas riĉulo, diris Thenardier al sia edzino. Ni devas esti atablaj kun li.

Cosette rigardis ĉiam la pupon, ne alproksimigante.

— Cu mi povas, sinjorino?...

— Certé, diris sinjorino Thenardier, ĉar sinjoro ĝin donacis al vi.

Cosette prenis la pupon, poste ŝi sidiĝis kaj rigardis ĝin nenion dirante.

— Ludu do, Cosette, diris la nekonatulo.

— Ho! mi ludas... respondis la infanino.

Nun, estis la filinoj Thenardier kiuj envie rigardis Cosette.

Kaj, ĉar estis jam malfrue, la viro petis por kuŝiĝi. Cosette supreniris kun sia pupo en siaj brakoj, kaj ekdormis tiel.

La morgaŭan tagon, la nekonatulo petis sian kalkulon por foriri. Li diris al sinjorino Thenardier :

— Ĉu via negoco estas prospera?

— Ne tro, ŝi respondis, Cosette kostas al ni multe!

La viro daŭrigis :

— Kaj se oni liberigus vin de ŝi?

La vizaĝo de sinjorino Thenardier ĝojigis :

— Ho! mia bona sinjoro! Forportu ŝin! Prenu ŝin!! Zorgu ŝin!!!

Sed Thenardier aperis. Li diris al sia edzino eliri, kaj sidiĝis.

— Sinjoro, li diris, mi amegas tiun infaninon.

La nekonatulo rigardis lin fikse.

— Jes, mi amegas ŝin, kaj ŝia foriro kaŭzus al mi multe da ĉagreno. Oni ne donas tiel infaninon al pasanto...

La nekonatulo ĉiam rigardis lin, nenion dirante.

Thenardier komprenis ke oni ne kredas lin. Tiam, li diris subite :

— Sinjoro, mi postulus mil kvincent frankojn!

La nekonatulo prenis bankajn biletojn el sia paperujo, metis ilin sur la tablon, kaj diris :

— Venigu Cosette!

Cosette alvenis.

La nekonatulo prenis ŝian manon kaj ili foriris ambaŭ.

Apenaŭ ili estis farintaj kelkajn paŝojn kiam Thenardier kuris post ili.

— Pardonu, sinjoro, li diris povante apenaŭ spiri, jen viaj mil kvincent frankoj. Mi reprenas Cosette.

— Vi reprenas Cosette?

— Jes, tiu knabino ne estas mia, ŝi estas al sia patrino. Mi ne havas la rajton doni ŝin.

La nekonatulo prenis sian paperujon. Thenardier kredis ke li havos tion kion li esperis : alian monon... La viro ne tiris plenmanon da bankaj biletoj, sed nur malgrandan paperon.

— La patrino de Cosette estas mortinta, li diris. Ŝi komisiis al mi veni serĉi ŝin!

Kaj, efektive, oni legis sur la papero « Vi konfidos Cosette al tiu homo ».

Thenardier restis mirigata kaj embarasita.

La nekonatulo reprenis la manon de la knabino kaj diris :

— Venu, Cosette!

Laŭ VICTOR HUGO.

Esperantigis PAUL BOULET.

MIKSAĴOJ

Prof. Vorobjev. — Dum la ribelado en Moskvo estis interalie mortigita en sia loĝejo Dr^o Vorobjev, privatdocento de l'Moskva universitato, unu el la konataj rusaj medicinistoj. La mortigito estis senkulpa ofero de l'arbitro, reganta en Rusujo. Laŭ gazetaj komunikoj la profesoro Vorobjev havis kun sia mortiginto Ermolov, oficiro de polico, nur la sekvantan interparoleton :

— Ĉu vi estas priv-docento Vorobjev?

— Jes

— Ĉu vi helpis la vunditojn en la nomo de l'Ruĝa Kruco?

— Jes, mi, kiel kirurgiisto, helpadis ĉiujn senescepte kaj senpartie; ĝi estis mia morala devo.

Tiam la oficiro sen ia konsekvenco demandis la profesoron :

— Ĉu vi havas ian batalilon?

— Jes, mi havas revolveron.

— Ĉu vi ne scias, ke laŭ ordono de l'general-guberniestro tio ĉi estas malpermesita?

— Jes, mi scias, sed mi havas la permeson.

— Montru.

La profesoro sin returnas kaj faras kelkajn paŝojn por elserĉi kaj montri la dokumenton, dum la oficiro paŝas sur lian nukon kaj mortigas lin. La humana profesoro-heroo mortis pro sia devo kuracista; lia glora nomo estos ne forgesbla kaj ĉiam restos sankta por la pluaj generacioj de medicinistoj.

BORIZO KOTZIN.

Poŝtkartoj ilustritaj. — La subaj landoj akceptas korespondadon sur la adresflanko de la bildokartoj :

Anglujo, Germanujo, Aŭstrujo, Belgujo, Brazilujo, Bulgarujo, Kanado, Ĉilio, Kosta-Riko, Kreto, Danujo, Hispanujo, Francujo kaj francaj kolonioj, Grekujo, Islando, Italujo, Luksemburgo, Meksikujo, Montenegro, Paragvajo, Holando, Peruo, Portugalujo, Norvegujo, Rumanujo, Rusujo, Siamoj, Svedujo, Svisujo, Urugvajo.

La sekvantaj landoj akceptas la gluon de marko sur la dorsflankon :

Danaj Antiljoj, Belgujo, Kaplando, Cejlono, Ĉilio, Kongo, Kosta-Riko, Kubo, Kuracao, Egiptujo, Nordamerika Unuiĝo, Francujo kaj francaj kolonioj, portugala Gvineo, angla Gviano, Hong-kong, Italujo, Luksemburgo, Malto, Maŭrico, Meksikujo, Oranĝo, Paragvajo, Persujo, Rumanujo, Rusujo, Siamoj, Svisujo, Urugvajo, Nova Zelandoj.

Novajo por blinduloj. — Laŭ *Daily Chronicle*, la « Braille-Preskompanio Edinburga » fabrikas novajn librojn el aluminio. La punktoj estus multe pli legeblaj sur tiuj folioj ol tiuj presitaj sur papero, precipe por homoj malfrue blindiĝintaj. La materialo bedaŭrinde estas multekosta ; sed kompanse ĝi estas pli fortika kaj nedifektigema.

E. J. CATT.

Kontraŭ absinto. — Svisujo, la « patrujo de l'absinto », kiel diras Francoj, ĵus donis la unuan baton al sia « infano ». La Vaud'a kantono prezentis petskribon kun 80.000 subskriboj al la Granda Konsilantaro por ke tiu ĉi malpermesu la vendadon de tiu ĉi frenezigilo en la ĉirkaŭaĵoj kaj aliaj lokoj publikaj en la kantono. Leĝo malpermesanta la pomalgrandan ven-

dadon de absinto estas akceptita de 126 voĉoj kontraŭ 40 kaj 15 nepartoprenoj. Simila movado fariĝas nun en Genève kaj aliaj kantonoj.

Por la Lapoj. — La dana parlamento okupis sin pri la religia instruado en Grenlando. Parlamentano, pastro Bjerre, postulis, ke oni komisiu tiun instruadon al Lapaj pastroj prefere ol al danaj, ĉar li diris, « la danaj pastroj ne scias sin komprenigi facile de la Lapoj ». Li citis ekzemplojn : laŭ lia diro, estus absolute necesa traduki la « Patro Nia » laŭ nova maniero pli komprenebla por la tieaj loĝantoj, kiuj ne povas kompreni la frazon « donu al ni nian ĉiutagan panon » ĉar pano tie absolute ne ekzistas kaj la plejmulto de la Lapoj neĝiam vidis eĉ unu pecon kaj ne povas imagi tion, kio ĝi estas. Sed ili tuj komprenus « donu al ni nian ĉiutagan grasaĵon » ĉar la grasaĵoj en tiu lando formas la ĉefan parton de l'nutraĵo.

Oni parolas fremdlingve. — En la hungara ĉefurbo, Budapeŝto, okazis la sekvanta amuza historio.

Spicvendisto vidis la sekvantan surskribon sur la enirejo de alia spicvendisto, lia konkuranto : « *English spoken* ».

— Kion signifas tiuj strangaj vortoj ? — li demandis.

— Tio signifas : « oni parolas angle ». Mi havas anglan helpanton.

— Hm, — rediris la demandinto, — tion mi ankaŭ faros. Mi havas germanan helpanton, kaj mi mem ankaŭ parolas germane.

— Mi ankaŭ. Sed la kapableco paroli germane ne estas fanfaroninda; preskaŭ ĉiu dua komercisto en Budapeŝto ja parolas germane.

Ha ! bona ideo ! Mia filino parolas france, — li ekkriis ĝoje, kaj rapidis hejmen, desegni la glorigan surskribon.

Kaj la sekvintan tagon la preterirantoj mirigite legis la kuriozan surskribon sur la pordo de nia saĝa spicvendisto : « *Französisch spoken* ».

El hungara ĵurnalo tradukis HUGO REGÉCZY.

Juĝisto : Kiel povas vi neigi tion, se dek atestantoj diris ĵus al vi ke ili vin vidis !

Juĝato : Dek, kiuj min vidis ! Sed mi povas alkonduki dudek kiuj min ne vidis !

Instruisto : Kial portas kelkaj bestoj sakon sur ventro ?

Lernanto : Por povi tien kaŝiĝi kiam ili estas persekutataj.

Patrino (puninte ĵus la fileton) : Kaj se mi punas vin, ĉu vi pensas ke mi ĝin faras por mia plezuro ?

Infano : Do por kies plezuro vi punas min ?

En ekspozicio : antaŭ moderna pentraĵo.

— Mi certigas vin ke ĉi tio estas sceno el turmentejo.

— Kaj mi diras ke, ĝi estas interbatalo de tigroj en marĉaĵo.

Oni serĉas en gvidlibreto : La pentraĵo prezentas « sunkuŝigon sur maro »

— ŭ —

Nuntempa

Kiu havas monon,
Tiu povas aŭtomobilon akiri;
Kiu havas nenion,
Tiu devos alie morti.

Miksaĵojisto.

Japanaj proverboj

Profeto scias per si mem nenion.

Deŝirita floro ne povas reviviĝi.

Sep foje falu, kaj ok... releviĝu !

Kiu estas for de sia patrujo, tiu ĉiutage pli malproksimiĝas de ĝi.

La feliĉo estas en malscio.

Kion vi havas, tion vi ne volas. Kion vi volas, tion vi ne havas.

Terkultura Kalendaro

(daŭrigo)

J U N I O

Plenkreska vegetado! Konvalon antaŭnelonge ni kolektis en arbareto! — Jes! sed antaŭlonge, — tion ja ni rimarkis de la unuaj tagoj de l' jaro, — la verdaĵo ekmoviĝis; poste ĝi pli densiĝis iom post iom, precipe dum la lastaj aprilaj semajnoj kaj antaŭensaltinte (proksimume je la radiluma Pasko) de la mallibereja flordomo en la malfermitan ĝardenon kaj de tiu ĉi en la birdologatajn bosketojn, ĝi rapide laŭiris la tintantan rivereton, ĉirkaŭis la gajan lageton, ĉirkaŭprenis ameme la suprajn ŝtonegojn de la fonto; ĝi saltis, tiel diri, de arbo sur arbon, de arbetaro en arbetaron, en kampojn, sur malproksimajn montetojn, ĝis kiam ĝi atingis arbaregon profundegan.

Suno kaj floroj, fruktoj kaj verdaĵo, jen unuvorte Junio. Fervora kaj brila suno, senintermanka suno fierege, majeste traŭiras senmakulan ĉielan bluaĵon; kaj ĉe niaj piedoj, tie ĉi kaj tie, ĉarmaj kaj karesaj floroj ĉiuspecaj, ĉiugrandaj, je dolĉegaj bonodoroj, eliras el tero. Dika, vivkolora, riĉa verdaĵo submetas al niaj paŝoj luksan kaj agrablan tapiŝon, al niaj okuloj dolĉigantan vidaĵon; jam ekaperas multaj fruktoj, kies bonega molaĵo nin ĉiujn kaj ĉiujarajn tuj plezurigos; jen mallonge, kion alportos al ni la novnaskiĝanta monato.

Vere la naturo ŝajnas pli kaj pli ĝojiga kaj alloganta, kaj samtempe ĝi ankaŭ pli kaj pli riĉiĝas, ricevante sub nia klimato sian plej belan disvolviĝon.

Laŭlonge de larĝaj vojoj, sur kies bordkrutaĵoj, kiel sur la randaĵo de l' vojetoj, sin montris grandanombre papiliformaj floroj, ekfloras tute la kreskaĵaro, eĉ en niaj tritikaj kampoj, kie multiĝas cejanoj kaj sovaĝaj papavoj, kiel ajn la terkulturistoj volis ilin antaŭe ventoli kaj sarki.

Vidu kiel la ruĝo de tiuj ĉi kaj la lazuro de la unuaj disiĝas el la brunruĝa koloro de la tritiko. La adonisoj elmetas al la sunaj fajroj siajn ruĝegajn florfolietojn, kiujn ili fermas kontraŭ la nokta astro; venusa spegulo malfermas siajn violkolorajn florojn simetrie fermiĝantajn je ĉiu vespero; liliaj suprenrampantaj kreskaĵetoj rozkoloran kaj blankan sian kroneton vidigas, kaj rubigo altigas ĝis la pinto de la spikoj siajn belegajn trompetformajn purpurajn kapetojn.

Tiun ĉi vidaĵon tamen malpli ĝuas terkulturisto ol poeto aŭ

pentristo, ĉar efektive la ĉi tieaj floroj, kiujn ni ŝatas kiel ornamaĵon, miksitaj kun greno, kaŭzos al li pli malfrue penadon kaj domaĝon. Pli valoras certe dika tritiko ol plej bela sovaĝa rozo, li opinias, tial ke la tempo mankas al li por poetiĝi.

Li estas de nun devigata, antaŭ la dudekkvara de Junio, duafoje plugi la senkulturejojn, kaj tion zorge, profundege plenumi; tien ankaŭ li tuj sterkaĵon enkondukos; li jam pretigas la tritikan semon, trempigante ĝin en kalkakvon, antaŭ ol semi. Ne, la tempo ne estas ja poezia por la kamparano, kiu devas sarki, kaj same prilabori (duan fojon ankaŭ) multajn kulturaĵojn, kiel terpomojn, maizon, betojn, karotojn, fabetojn, rutabagojn, ĉiujn furaĝajn kreskaĵojn.

Laŭ la teroj, kiuj estas pli aŭ malpli argilaj aŭ torfaj, oni aldonas de 60 ĝis 300 hektolitroj da kalko por unu hektaro. Oni enfosigas ankaŭ verdajn grasigaĵojn, komunan trifolion, spergulon, k. t. p.

Rutabagaso estas Sveda napo, je flava internaĵo tre fortika, tre produkta, kapabla daŭri dum la tuta vintro en sanaj teraĵoj. Oni kulturas ĝin, en precipa kulturo, kiel napon, tamen iafoje idareje, kaj ĝi estas, dum Junio, repikata kiel la du jenaj: brasikoj napoj kaj brasikoj rapoj. Tiuj ĉi ja povas esti tuj kulturataj en loko; plej ofte tamen oni semas ilin idareje dum Marto-Aprilo, kaj tamen oni repikas ilin en plenan teron post ses semajnoj; vi faru cetere pri ili kiel pri la beto kaj karoto.

Malmultaj estas nunatempe la semadoj, kaj ili preskaŭ nur rilatas poligonon, onobrikon, kardegojn, napetojn, kaj napojn. Ni uzos proksimume 3 ou 4 kilogramojn da napsemo por unu hektaro. Ni ne tro prokrastostamen, dum la unuaj tagoj sekvantaj la 15^an de Junio, kaj ĝis la 15^a de Julio, ĵetfluge semi rutabagojn kaj brasikojn napojn, kiujn vi zorge kovros per erpilo; poste vi semos idareje brasikon « kavaliron » kaj brasikon « branĉozan ». Pri la betoj, linie semitaj en majo, aŭ de Aprilo — po 4 aŭ 5 kilogr. da semoj por hektaro — kaj jam internigitaj per rulilo, vi faras nun unuan prilaboraĵon; same pri la karotoj.

Sed la precipa tiama zorgo estas la fojnigo. Fojnigi, tio signifas falĉi, sekigi turnante kaj reŭturnante sub suno la fojnon, ĝin garbarigi, kaj ĝin enkonduki en tenejon; ĉio ĉi estas grava, postulas multajn brakojn aŭ diversajn maŝinojn; kaj ĉar la fojnigo komenciĝas ĝenerale proksimume ĉirkaŭ la festo de Sankta Johano, tio estas la 24^a de Junio, ĝi estas ofte peniga pro la troa varmo.

Oni eltondas la herbojn de la naturaj herbejoj per falĉilo, kaj tial ke oni ne timas perdi foliojn, oni velkigas per meĥa-

niko por disĵeti la herbon sur la kampo, kaj sekigi ĝin. Vi uzos ankaŭ rastilegon kun ĉevalo por amase kolekti kune kun ĝi la kreskaĵojn de la semitaj herbejoj tuj kiam ekaperas la unuaj floroj.

La plej bonaj kreskaĵoj difinitaj por artefaritaj herbejoj estas luzerno, onobriko kaj trifolio, semitaj ordinare tra printempa greno; kaj inter ĉiuj ĉi lastaj, plej produkta estas la blanka trifolio, kiu sola donas pli multe da manĝotaĵoj ol la tutaj aliaj legomaj kreskaĵoj; ĝi estas la bonega legomaĵo de l'herbejoj kaj paŝtejoj, tute sukcesanta en la nordaj kaj centraj herbejoj de Francujo.

Tial ke ne nur la homoj sed ankaŭ la bestoj suferas pro la troa, tiel laciga, varmo, oni tre zorgos ilin antaŭŝirmi kontraŭ la fervoregaj sunaj radioj, kaj samtempe kontraŭ la pikvundoj de la muŝoj.

Martaj ĉevalidoj estos apartigataj el siaj mamnutristinoj, kaj ĉevalinoj naskintaj en aprilo denove povos labori en la kamparo. Vi apartigos ankoraŭ la februarajn aŭ martajn ŝafidojn el iliaj naskintinoj, kaj vi nutros ilin per verda nutraĵo. Vi same faros pri la bovbestoj al kiuj vi donos, se okaze verdaĵo mankos, pizojn kaj furaĝajn kreskaĵojn plantitajn en Marto.

Tiu momento estas ankaŭ favora por tondi la ŝafojn. Bona laboristo sukcesas tondi 20 ŝafojn ĉiutage. Duoblan utilon do prezentas edukado de ŝafoj, ĉar ili produktas samtempe multe da viando kaj lano. En iaj landoj, kiel en Roquefort (Francujo) ekzemple, oni uzas ŝafinojn pro lakto per kiu oni fabrikas fromaĝon. Tiamaniere ŝafino de la Larzaka plataĵo donas proksimume 60 litrojn da lakto; kaj 100 litroj da lakto formas 22 kilogramojn de fromaĝo.

Pri la tondo oni kutimas, tie ĉi kaj tie, lavi lanon antaŭe sur la dorso de la bestoj: oni ricevas tiam lavitan lanon; aliloke, ĉar oni ne agas sammaniere, oni nur atingas ne lavitan lanon. Plenkreska ŝafo povas liveri kvinkilograman ŝaflanon, ne lavitan; kiam ĝi estas lavita, tiu ŝaflano perdas 30 aŭ 40 100-onojn de sia pezo.

Verda trifolio, laktuko kaj urtikoj duone sekigitaj estos tre bona nutraĵo por la porkoj.

Feliĉiga estas Junio inter ĉiuj monatoj por la ĝardenisto. Kvankam tiu ĉi devas surverŝi ĉiuvespere (pli bone estas ol matene, ĉar tutnokte kreskaĵoj profitos akvon), kvankam li devas senherbigi, tondeti, sarki la herbarojn, forpeladi majsakarbojn, kaj iliajn blankajn vermojn, li ĝojege tamen rigardas sian ĝardenon plene fruktodonan. Li finas la rikolton de aspa-

ragoj, ligas ĉikoriojn, skarolojn, kaj romanajn salatojn, por ke ili blankiĝu, faldas trunketojn de ajlo kaj pretiĝas glpreni artiškojn.

Li daŭrigas semi diversajn legomojn rapide kreskontajn, por trafi senintermankan produktaĵon: laktukojn, fazeolojn, napojn, pizojn, rafanetojn, ĝardenan kreson, salatberojn, skorzonerojn, spinakojn, kardonojn (loksemitajn), ĉiuspecajn fazeolojn. Tio nature postulos oftajn surverŝojn. Tiam ankaŭ li tondas melonojn, tomatojn kaj kukumojn, ne tonditajn en Majo.

Li daŭrigas en frukta ĝardeno la rimedojn kontraŭ ojdiuamo kaj mildjo; kaj sammomente la pinĉadon, palisprovizadon, la malmultigon de fruktoj; li jam rikoltas ĉerizojn, frambojn, ribojn.

La vinberoj bezonas esti ĉizataj en la dua dekkvino de tiu monato; tio konsistas en la forigo de la malbone formitaj aŭ tre malgrandaj beroj, kaj celas ricevi belegajn berarojn.

Tial ke multaj estas la fruktoj atakitaj de la insektoj, kiuj falas de la arboj, oni devas ilin zorge ĉiutage kolekti kaj bruligi: sola rimedo por malaperigi nome la *karpokapson* aŭ pomkaj pir-raŭpon kiu, aliformiĝante papilio, naskas nekalkuleblan idaron, kies difektaĵoj estos grandegaj en la sekvanta jaro.

Pri la raŭpoj jam vagantaj sur arboj, sufiĉos ofte ŝurspruci ilin per miksajo da unu kilogramo da nigra sapo kaj kvindek litroj da varma pluvakvo.

La ĝardenfloristo daŭrigos planti florojn en korbegojn kaj terstriojn, precipe li enmetos varmejajn kreskaĵojn: begoniojn, kolensojn, lobeliojn, alternanterojn; li finos lokmeti kreskaĵojn jarajn, kaj semos ĥinajn primolojn, geraniojn, k. t. p. Oni povas tiam facile diversigi la florornamaĵon de la bedoj, masivoj, kaj terstrioj. Japanaj magnolioj je kadukaj floroj, ekfloras, prezentante belegan vidaĵon, kaj samtempe multaj bulbaj kreskaĵoj, inter kiuj ĉiuspecaj lilioj.

Protektontan stangon jam bezonas dalioj, kies senutilajn trunketojn oni forigos, konservante el ili nur unu, kiu estos necesa ĉarpentaĵo. Rozujoj ekfloras denove, precipe se ili estas tre purigitaj post sia unua florado, kaj se vi surverŝos ilin sufiĉege.

Daŭrigi la tondadon de la arboj ekflorontaj printempe, forpreni burĝonojn el rozujoj, por ilin enmeti sur aliajn ŝtipojn, pajligi florplantejojn, kaj ankoraŭ kaj ĉiam pinĉi tiujn kiuj emas plialtiĝi, por ricevi pli multajn branĉetojn kaj florojn.

Intertempe la kulturisto sanigas la senkulturejojn per defluilaj tuboj; li purigas fosaĵojn kaj marĉetojn, kies ŝlimon

li uzas por fari grasigajn kunmetitaĵojn ; li riparas la vojojn kaj vojetojn, sarkas kaj prilaboras la plantujojn en arbaro, daŭrigas aŭ finas la komencitan fojnigon... kaj neniam trovos tempon necesan per admiri la ĉarmecon de la bela naturo, dolĉega tamen kaj penetranta...

Paul CHAMPION.

UJO, ARBO, LANDO

Gramatika romano

Ho ujo, ujo! bona vorto,
Profunda, plena, grasa, fuma!
Supujo kun la larĝa ventro,
Teujo kunodoro ĉarma!
En kuirejo paŝadante
Mi multajn ujojn admiregas
Jen kestoj, potoj, kaseroloj;
Kaj el la kor' elfugas krio:
Ujo, ujo, uj'!

Ho arbo, arbo! bela nomo,
Fortika, vibra, mola tamen!
Pomarbo kun printempaj floroj,
Oranĝarbaroj la italaj!
Mi vin ne miksos, arbo, ujo.
Ho vinfaranto, kio estas
La vinberujo? — Peza korbo.
— Kaj vinberarbo? — Ĝojkreskaĵo!
Ujo, ujo, uj'!

Ho dolĉa diro, lando, lando!
Germána? ne nun, Esperanta.
Ho Greklando, lunaj bordoj!
Ho franca mia patrolando!
Patrujo, kio do ĝi estas?
Patrujo estas kaldronego
En kiu foje sovaĝuloj
Kuiras tri, kvar maljunulojn.
Ujo, ujo, uj'!
Land', arb', uj'!

RENÉ DESHAYS.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Modo ordona en dependaj propozicioj

La demando pri la *modo ordona* estis antaŭ ne longe priparolata en diversaj esperantistaj gazetoj, nome en « *Lingvo Internacia* » (1^a de oktobro 1905) kaj en « *The Esperantist* » (Novembro 1905). Post la legado de la du artikoloj kaj ankaŭ de la « *Esperanta Sintakso* », mi fariĝis scivola, ĉu la komuna uzado de la plej bonaj verkistoj en lingvo internacia akordiĝas aŭ ne akordiĝas kun la eldiritaj opinioj. Mi do atentege tra legis niajn du modelajn verkojn, *Hamleto* kaj *Fundamenta Krestomatio* kaj ankaŭ la bonegan libreton de Sr^o Grabowsky, *Kondukanto kaj Antologio*. Mi zorgeme ĉerpis dum la legado ĉiujn frazojn, en kiuj mi povis ektrovi ekzemplon de la modo ordona en dependa propozicio (1). Poste, el la komparo de la multegaj ekzemploj ricevitaj, mi povis eltiri la sekvantajn observaĵojn, kiujn tamen mi ne kuraĝus nomi reguloj.

La modo ordona renkontiĝas en propozicioj dependaj nur post esprimoj, kiuj montras : 1^e Intencon aŭ celon ; 2^e Volon aŭ ordonon tute malkonfuze ; 3^e iom pli konfuze la saman signifon de volo aŭ ordono.

I. — Intenco aŭ celo.

1^e Post la konjunkcio *por ke*, ĉiam senescepte troviĝas la modo ordona, eĉ kiam la signifo aperas kiel malplej ordona aŭ vola.

En Anglujo mi vidis tiel maldikan fraŭlinon, ke ŝi du fojojn bezonis eniri la ĉambron, por ke oni povu ŝin rimarki (krestom., 88), (La nombro montras la paŝon).

Permesu al mi saluti antaŭe vin en tia maniero, por ke mia sintenado kontraŭ la aktoroj ne havu la vidon de pli bona akcepto ol la via (Haml., 63).

(1) La laborado estis kvankam iom longa, tamen neniel teda, ĉar tia tralegado aperigas tie ĉi kaj tie nemultajn esprimojn, kiuj kontraŭas, almenaŭ ŝajne, la principojn de nia lingvo Esperanto, kaj pri kiuj estus tre utile, ke la *lingva komitato* diru, ĉu ili estas nenio alia ol neeviteblaj preseraretoj.

Por ke ĉiuj povu uzi la lingvon egale, estas necese, ke ekzistujaj modeloj leĝdonaj por ĉiuj (krestom. antaŭparolo, V).

Vi jam devas pretiĝadi por la alia mondo kaj venigi la pastron, bonfariston, por ke li al vi pardonu viajn pekojn. (Grabowsky, 107).

Absolute nenie mi trovis ekzemplon similan je la frazo citita de S^{ro} Fruictier : *Kiu povis pensi antaŭ du jaroj, ke tiu malfeliĉulo tiel forte laboras por ke li ruinigos* ». (Esper. sintakso, paĝ. 69). Tamen mi tre sincere konfesos, ke tiun ĉi frazon mi trovas tute korekta kaj bonstila, ĉar tie ĉi la konjunkcio *por ke* tute perdis sian kutiman signifon de intenco aŭ celo, kaj montras efektive nur rezulton neniel intencitan de la subjekto.

Okazas iafoje ke la vorto *por* forestas, kaj la intenco aŭ celo estas montrata nur per la konjunkcio *ke* sola; en tiaj okazoj la uzado aperas absolute tiel sama kiel post *por ke*. Ekz :

... Kaj provos mi denove
Ataki per rakont' orĉelon vian,
Ke ĝi forĵetu sian obstinecon (Haml. 3).

La venenan herbon
Ne sterku, ke ĝi pli ankoraŭ kresku (Haml. 108)

Kaj li malkovris la manon, ke la serpento tie mordu (Krestom. 33)

Ne povante al si helpi, oni ĵetis la korpon al hundoj, ke ili ĝin disŝiru (Krestom. 63).

Kaj tute apude oni legas : Oni ĵetis la korpon en profundan marĉon, *por ke* la koto ĝin kovru kaj ripozigu (d° d°).

Iafoje ankaŭ, sed pli malofte, la konjunkcio estas plilongigita kaj ŝanĝita en *por tio ke*. Ekz :

Tutajn jarojn devas uzi franco aŭ anglo por tio, ke li ekpovu regule skribi en sia patra lingvo. (Krestom, 201).

Li donis al ni saĝon ne por tio,
Ke ĝi en ni sen uzo pereadu (Haml. 121).

2° La intencon aŭ celon montras ankaŭ la esprimoj : *tiel ... ke, tiamaniere ke* kaj aliaj similaj; tial oni trovas post tiaj esprimoj la modon ordonon, kiam ili havas intencan signifon : Ekz.

... prezentu liajn mankojn
En tia lumo, ke ili aperu
Kiel makuloj nur de libereco. (Haml. 43)

ŝia patro

Kaj mi — ambaŭ staros nun tiele,
Ke, ne vidataj mem, ni ĉion vidu
Kaj povu bone juĝi ... (Haml. 73)

Se vi pri montoj babiladas, lasu
Nin superŝuti per tiom da tero,
Ke sin la loko levu ĝis la suno ... (Haml. 155)

La unua penso de la organizatoro estis : doni la eblon al pli maljunaj homoj plenigi la mankojn sed en tia maniero, ke la lernado ne alportu malhelpon ... (Krestom. 201).

Kontraŭe oni trovas la modon indikativan aŭ kondiĉan post la diritaj esprimoj, kiam ili esprimas nur rezulton akiritan : Ekz.

La vaporoj formis la plej strangajn figurojn, tiel ke estis terure ilin vidi (Krestom. 51).

Kaj tiel amis li patrinon mian,
Ke al la vento eĉ li ne permesis
Vizaĝon ŝian tuŝi. (Haml. 15)
Tri fojojn ĝi ripetas sian marŝon
Antaŭ la teruritaj oficiroj,
Proksime tiel, ke per halebardo
Ĝin ili povus tuŝi. (Haml. 18)

Sed kelkaj frazoj havas per si mem nur duban signifon tiamaniere, ke ili povus esti komprenata tiel bone kun signifo de intenco aŭ celo kiel kun signifo de rezultato; en tiaj okazoj la verkintoj uzas unu aŭ alian modon laŭ la ideo kiun ili volas esprimi. Ekz. :

Hamleto baldaŭ venos: ni aranĝis,
Ke tie ĉi li kvazaŭ per okazo
Renkontos Ofelion. (Haml. 73).
Mi vin obeos, reĝo, tiom pli,
Se vi aranĝos la aferon tiel,
Ke li per mi ricevu sian morton (Haml. 136)

Se vi ne akiros la amon de la princo, tiel ke li pro vi forgesu patron kaj patrinon, alligiĝu al vi per ĉiuj siaj pensoj... (Krestom. 136).

... Nur, se homo vin tiel ekamus, ke vi estus por li pli ol patro kaj patrino... (Krestom. 46).

3° Kelkaj verboj ankaŭ havas ordinare signifon de intenco

kaj celo, kaj postulas en la dependa propozicio la ordonan modon. Tiaj estas la verboj: peni ke, zorgi ke, atenti ke, observi ke, doni ke, fari ke, sin gardi ke, k. t. p. Ekz.

Horacio, kiam vi tralegos tiun ĉi leteron, penu, ke tiuj ĉi maristoj venu al la reĝo... zorgu, ke la reĝo ricevu la leterojn, kiujn mi sendas... (Haml. 132, 133)

Sed tio ĉi montras nur, ke la naturo zorgis pri tio, ke ne tuj pereu ĉiu ekzistaĵo, kiu vivas ne precize laŭ ĝiaj reguloj. (Krestom. 188)

Precipe ni turnis lian atenton sur tion, ke li ne komuniku la okazintan malfeliĉon al la maljunulino subite. (Krestom. 91).

Ni bedaŭru ilin, sed nin gardu, ke ni ilin ne sekvu. (Grabowsky Konduk. 23)

Sed ankoraŭ en tiaj frazoj oni povus renkonti la modon indikativan, ĉiufoje kiam la aŭtoro intencas montri nur rezulton : Ekz. :

Ni faros

Ke oni antaŭ li vin forte laŭdos... (Haml. 140).

Jen tio nin haltigas; tio faras

Ke la mizeroj teraj longe daŭras. (Haml. 75).

II. — *Volo aŭ ordono malkonfuze esprimita.*

1° Post verboj aŭ esprimoj kiuj montras *volon aŭ deziron eĉ plej malfortan, aŭ ankaŭ permeson*, ni trovas ĉiam la ordonan modon. Tiaj estas la verboj : voli, deziri, sopiri, fervori, decidi, konsenti, ami, permesi, toleri, devigi, malpermesi aŭ malhelpi, k. t. p. Ekz :

Li volas, ke kun li oni parolu (Haml. 4).

Ili proponas 5000 dolarojn da rekompenco al la persono kiu konsentus, ke oni faru al ĝi operacion... (Krestom. 199).

Tion mi dezirus al vi, ke vi estu tia honesta homo (Haml. 55).

Mi devas al vi rimarki, ke mi amas, ke oni akurate pagu la luan pagon (Krestom. 80).

Li petas mian manon; ĉu vi permesas, ke mi ĝin donu al li ? (Krest. 81).

Kiel do ne venis al ili en la kapon kontentiĝi inter si, ke unu el tiaj kolektoj da kondiĉaj sonoj estu enkondukita por la reciproka kompreniĝado (Krestom. 272).

2^o Same post verboj aŭ esprimoj, kiuj montras *ordonon*, *peton aŭ konsilon*, ĉu per si mem kiel ordoni, postuli, peti, petegi, inviti, proponi, konsili, konvinki, komisi, k. t. p., ĉu okaze, kiel la verboj diri, skribi, krei, ripeti, resti... kaj aliaj.

Sed mi konsilus, se vin ĝin aprobas,
Ke ŝia reĝa moŝto la reĝino
Al ŝi alvoku post la komedio
La princon kaj ŝi petu lin patrine
Ke li al ŝi malkovru sian koron (Haml. 79).

Pastro postulis, ke Lizandro konfesu al li sian plej ĉefan pekon (Krestom. 62).

Unu el la alestantoj proponis, ke oni esprimu al la talenta satiristo la studentan gratulon (Krestom. 85).

Kaj tial mi lin tien ĉi invitis,
Ke li kun ni maldormu nunan nokton (Haml. 3).
De l'ter' al la ĉiel' ĝi laŭte krias,
Ke mi ne lasu ĉion sen kalkulo (Haml. 131).

La reĝido diris : ke ŝi estu ĉiam apud li (Krestom. 53).

Mi devas ĉiam ripetadi al li, ke li estu singardema (Grabowsky konduk. 13).

Ni skribis, ke retenu li la nevon
De liaj krimaj arogantaj agoj. (Haml. 10).

Ĉar eble vi aliajn... povos konvinki, ke ili faru al si sian situation kiel eble plej oportuna (Krestom. 112).

III. — *Volo aŭ ordono pli malpli konfuze montrita.*

Oni renkontas ankoraŭ la modon ordonan kun la konjunkcio *ke* post esprimoj, kiuj nur pli malpli konfuze havas volan aŭ ordonan signifon, kaj inter kiuj oni trovas precipe multajn adverbajn esprimojn kun la verbo *esti*. Ni citu ekzemple.

1^o Estas eble, estas neeble, estas necese, estas sufiĉe, kondiĉe, ke... en kiuj estas facile rekoni la volan sencon, ĉar oni povus ilin anstataŭi per aliaj esprimoj : nenio malhelpas, nenio permesas, la cirkonstancoj postulas ke, estas nur postulate, k.t.p. Ekz.

Ĉu ne estas eble, ke ni komprenigadu per ia alia lingvo? (Haml. 162).

Se por la tutmondeco de ia lingvo estas sufiĉe, ke unu persono ĝin nomu tia... (Krestom. 243).

Por ke la adresito... komprenu vian skribon, estus necese, ke antaŭe ne sole elternu la gramatikon, sed ke li ankaŭ akiru en ĝi sufiĉan spertecon (Krestom. 251).

2^o Meriti...ke, esti inda ke, (tiuj esprimoj signifas, ke oni havas la rajton postuli ke...) Ekz.

Ĉu tiuj ĉi ostoj meritis nenion alian, ol ke oni ludu per ili keglojn? (Hamlet. 146.)

La dometo estas inda, ke vi ĝin aĉetu (Krestom. 137).

3^o Estas prudente, estas saĝe, estas ĝentile, estas dece aŭ decas, konvenas, estas honeste, estas bone, estas utile... ke..., k. c. La prudento, la saĝo, la ĝentileco la utileco... postulas ke Ekz...

Prudente estas, ke ni al li kedu
Nur tiom, kiam povas li plenumi
La vorton sian. (Hamlet 22).

Estus certe tute bone

Ke vi al li raportu tuj pri ĉio. (Haml. 109).

Oni raportas al li... ke estus bone, ke li ilin malgrandigu (Krestom. 103).

Li eĉ ne alatendos la bonfariŝton, kaj... bone estas, ke li almenaŭ ne mortu sen baptito (Grabowsky. Antol. 107).

Rimarko. — Tamen oni rimarkos ke en samaj kazoj troviĝas ankaŭ la dependa propozicio esprimita per la konjunkcio *se* kun indikativo aŭ kondiĉa modo, laŭ tio, se oni montras la fakton kiel tute realan aŭ kondiĉan. Ekzemple :

Estas sufiĉe, se ni nur enkomune vidos, kio ĉio estis farita en tiu ĉi rilato... (Krestom. 257).

Eĉ kun la konjunkcio *ke* oni trovas alian modon ol la ordonan, kiam la fakto estas esprimita kiel certa. Ekz. :

Estas eble, se vi scias, ke mi ne scias... (Haml. 162).

En tia maniero estas eble, ke letero, kiu en Nov-Jorko estis donita sur la poŝton en la tago de forveturo de Llojda vaporŝipo, la plej malfrue post ok tagoj trovas sin jam en la manoj de la adresato (Krestom 221).

Tial oni povas konkludi el la antaŭaj ekzemploj, ke oni

povas uzi la ordonan modon post la antaŭcititaj esprimoj, nur kiam oni nepre volas montri signifon ordonan.

Se nun volas fari ĝeneralan konkludon el ĉiuj ĝis nun cititaj ekzemploj — kaj aliaj vere malsamaj estas nur tri aŭ kvar — ŝajnas, ke ni povas diri, konsekvence, ke oni devas uzi modon ordonan nur en la kazoj supre montritaj, t. c., kiam la frazo esprimas, ĉu per si mem, ĉu en la penso de la skribanto, ideon de *intenco*, *volo aŭ ordono*; kaj, ĉar *intenco*, *volo*, *ordono* estas ideoj tute proksimaj kaj samspecaj; tial ke oni povas diri, ke la intenco kaj la volo ĉiam ordonas ion, estas do nedisputeble, ke Dr^o Zamenhof tre prave donis al la preparolata modo la nomon *ordona*, kaj ne povis doni alian.

Nun restas nur, ke ni diru kelkajn vortojn pri la tri ceteraj ekzemploj, kiujn mi momente lasis aparte. Jen ili estas

1) Kun granda malfacilo kvietigis
Mi lian furiozon. Nun mi timas
Ke ĝi denove blinde ne eksplodu (Haml., 142).

2) Sed tiuj ĉi artikoloj estas ankoraŭ senkuraĝaj, kvazaŭ la aŭtoroj timas, ke oni ne enmetu ilin al publika malhonoro (El la raporto de S^{ro} de Beaufront (Krestom. 273).

3) Trovinte lian nomon en la membro de la honore distingigitaj kaj grave vunditaj ĉe Borodino, ŝi falis sensente, kaj oni timis, ke ŝia febro ne revenu. (Grabowsky, Neĝa, Antologio, 92)

Tiuj ĉi tri frazoj donas saman ekzemplon de la modo ordona uzata post la verbo *timi*, kaj ĉiuj tri estas la ĝustega traduko de la franca idiotismo (nacilingvaĵo) kun la nea vorto *ne*, kvankam neniel ĉeestas ia nea ideo. Estus certe tre mirinde, se la tri kazoj estus la rezultato de preseraro; almenaŭ tio ĉi ne estas vero pri la unua ekzemplo eltirita el Hamleto, kie la vorto *ne* estas necesa en la verso.

Mi tute ne scias, kiel oni povus pravigi tiajn frazojn, kaj misenofende juĝas ilin eraroj. « *Quandoque dormitat Homerus!* » Sed la plej stranga estas tio, ke tiuj tri frazoj estas absolute la solaj, en kiuj mi povis renkonti ekzemplon de la modo ordona post la verbo *timi*, mi vane traserĉis alian. Aldonu al tio, ke S^{ro} de Beaufront en siaj komentarioj pri Gramatiko, paĝon 83^an, tute malpermesas tian uzadon, kaj pri tiu ĉi punkto ŝajnas al mi, ke li estas absolute prava.

Efektive oni ne povos nei, ke la skribintoj de la tri supraj

frazoj estis altirataj per la uzo de la franca lingvo, kaj tute senatente uzis la modon ordonan kune kun la nea vorto *ne*; tial oni ne povas per tiuj ekzemploj argumenti por pruvi, ke la modo ordona estas uzebla post la verbo *timi*. Sed ĉar ĉiuj aliaj ekzemploj senescepte havas la modon indikativan aŭ kondiĉan, ni rajte povas konkludi, kiel S^{ro} de Beaufront, ke post la verbo *timi* oni ne devas uzi la modon ordonan, eĉ kiam la fakto aperas kiel plej dubebla.

Sinjoro, mi ne scias, sed mi timas,
Ke tiel estas. (Hamlet. 45)

Li kaŝas ion en la kor'; mi timas
Ke la sekreto de spirito lia

Danĝeron en si portas por ni ĉiuj. (Hamlet 79).

El ĉio supredirita vi vidas, ke ne ekzistas eĉ la plej malgranda kaŭzo por *timi*, ke aperus ia nova lingvo, kiu elpuŝus Esperanton (Raporto de S^{ro} de Beaufront. Krest. 369).

Tial mi ne povas aprobi la ekzemplon donitan de S^{ro} Fruictier (Sintakso, paĝ 52). « Mi timas, ke li venu » — « Mi esperas, ke vi ĉesu petoli », ĉar mi ne povas imagi, kiel la verboj *timi* kaj *esper* povus havi ordonan signifon. Timo kaj espero estas faktoj de la sentebleco, ne de la volo; okazas ja kelkafoje, ke oni timas kion oni nepre volas, kaj ankaŭ oni ne volas kion oni esperas.

G. QUESTE.

P. S. — Mi estis jam skribinta tiun-ĉi artikolon, kiam mi legis en ĵurnalo *Esperanto* la klarigojn de S^{ro} Ĉefeĉ pri la sama temo, kaj plezure vidis, ke liaj principoj tute akordiĝas kun miaj observaĵoj. Tamen mi permesas al mi rimarkigi pri la ekzemploj elpensitaj de la aŭtoro, ke la frazoj « *Estas necese ke mi parolas. Estis la devo de la patro, ke li povis...* k.t.p. » kaj aliaj similaj estas eble iomete naciidiomaj kaj ne tute facile kompreneblaj por neangloj. Se mi ne eraras, la signifo estas: « Mi parolas, ĉar tio estas necesa, aŭ, estas por mi necese paroli, mi absolute devas paroli »; en ĉiu okazo oni volas diri, ke « paroli » estas afero necesa, kaj mi ne bone komprenas, kial la uzo de la ordona modo estus tiam malpermesita.

DIVERSAĴOJ

La sankta Biblio Esperante.

Multaj Esperantistoj en multaj landoj jam pripensis: Kiel dezirinde estas, ke oni traduku la Biblion, aŭ almenaŭ la Novan Testamenton, en nian karan lingvon! Estas verŝajne ke multaj ĉapitroj, — eble kelkaj plenaj libroj, — jam ekzistas tradukitaj de apartaj personoj, pleje el naciaj tradukoj, ne el la greka originalo. En *Espero katolika* de Februaro 1906, paĝo 5, aperis proponoj por rom-katolika traduko. En angla gazeto, *European Christian Endeavor*, de Marto, 1906, oni trovas leteron de Pastro Henri Merle d'Aubigné, kiu citas la opinion de Profesoro Cart pri tiu ĉi afero. Sajnas, ke projekto pri traduko jam estas adresita al du aŭ tri el la ĉefaj Bibliaj Societoj, sed ne ricevis favoran respondon. La « Brita kaj Alilanda Biblia Societo » respondis, ke Esperanto ne estas nacia lingvo, kaj ke ĉiuj esperantistoj povas legi la Biblion en sia patra lingvo. M. d'Aubigné ne ŝatas tiun respondon, ĉar li pensas, ke multe da kleraj viroj legus la Biblion esperante, kiuj neniam legus ĝin en sia patra lingvo.

Sed kredeble la « Brita kaj Alilanda Societo » estas prava. La rezultato, kiun M. d'Aubigné atendas, estas malproksima kaj necerta. Gis la tempo, kiam diverslandaj esperantistoj kunvenos por solenigi kune la Diservon, esperanta traduko estos literatura kuriozaĵo pli vere ol praktike utila verko. Eĉ se oni aranĝos komunan Diservon ĉe la Kongreso de la Kristanaj Klopodantoj, aŭ dum la daŭro de la esperantista Kongreso mem, estos sufiĉe traduki elektitajn porciojn por tia celo: ne estos necese postuli tradukon de la tuta libro.

Kiel amantoj de nia lingvo, ni devas eviti troan rapidecon kaj senpripensecon pri tiu ĉi afero. La esperanta Biblio devas esti tradukita el la greka, ĉar alie ĝi ne povos esti internacia. Antaŭ ol la tradukontoj komencos sian laboron, ili devas reciproke konsenti pri kelkaj punktoj, — ekzemple:

(i) Kian grekan tekston sekvi? Kredeble la lasta teksto eldonita de Profesoro Eberhard Nestle estus akceptata plej bonvole.

(ii) Kiamaniere transskribi proprajn nomojn? Tio ĉi prezentas tre malfacilan problemon. Oni devos konsideri (a) nomojn el la Malnova Testamento kiuj aperas en la Nova, ekz. *Elias*: (b) hebreajn kaj arameajn nomojn ne trovitajn en la Malnova Testamento, ekz., *Bartolomeus*: (c) nomojn simple grekajn: (d) nomojn latinajn: (e) nomojn geografiajn: (f) kiel distingi inter viraj kaj virinaj nombj.

(iii) Ĉu la dua persono ununombra estas tradukota ĉiam per *vi* aŭ kelkfoje per *ci*?

(iv) Ĉu unuformeco estas ebla pri la traduko de la grekaj manieroj kaj tempoj?

(v) Kiel traduki difinitajn vortojn, precipe teologiajn, aŭ apartenantajn al la Nova Testamento? Estus facile tabeligi 50 aŭ 60.: ekz. (latine) *Hades, Gehenna, gratia, fides, caritas, justificatio, opera, sacrificium, oblatio, mansuetudo, revelatio*, k. t. p.

(vi) Ĝis kiaj limoj estos permesebla uzi vortojn, kiuj oni ne trovas en la *Universala Vortaro* aŭ la *Krestomatia*?

Sendube ankaŭ la publiko devas certigi ke la traduko prezentas korektan Esperanton. Traduko tro rapidigita aŭ nekorekta malutilus nian lingvon: bona traduko estos multekosta havaĵo kaj komuna trezoro por tuta Eŭropo, mi devas diri, por la tuta homaro.

Pastro JOHN CYPRIAN RUST.

Pri la Geneva Kongreso.

Ĉu mi bone legis en L. I. de l' 1^a de Aprilo pri la kosto de l'kongresa karto en Genevo? *Dek frankoj!!! Ho! ho!* Sendube mi eraris; ĉar tio estus troa, multe troa.

Kial, se en la Bulonja kongreso 3 frankoj donis la rajton partopreni ĉiujn ceremoniojn (kaj kiom interesaj!) kaj 2 frankoj plie havigis al la Kongresanoj ĉiujn dokumentojn, kial do tia sumo ne estus sufiĉa por la 2^a kongreso?

Ĉiuj Esperantistoj ne estas riĉaj, bedaŭrinde, kaj multe da ili certe ne povis iri al Bulonjo pro manko da mono. Ĉu la organizantoj de l' 2^a Kongreso kredas, ke de l'lasta jaro Esperanto riĉigis multajn! Ne ankoraŭ, kontraŭe; kaj mi konas en nia Grupo kelkajn — ne el la malplej lertaj kiuj intencis iri en Genevon, kaj, kiuj, mi unua, ne iros, se kiel unua deviga elzpezo oni postulos de ili 10 frankojn.

Mi opinias, ke oni devas penadi por altiri al niaj ĉiujaraj kunvenegoj kiel eble plej multe da kongresanoj por fari pli grandan, pli bruatan propagandon. Kaj por tio la unua kondiĉo de sukceso estas *kiel eble plej malmulte da elspezoj*. Oni pripensu pri tio.

L. RIGOR.

Ankoraŭ pri Dilpok

Mi legis en la 3^a N. de « L. I. » la artikolon de Sro Boris Kotzin pri la entrepreno de Sro abato Marchand kaj miris kial

estimata samideano estas tiel tolerema por S^{ro} Marchand kaj modesta en siaj konkludoj pri li.

Mi ankaŭ ricevis propagandan folieton de S^{ro} Marchand kaj antaŭ ĉio estis surprizita de lia ideo : propagandi sian lingvon inter la Esperantistaro (la adresojn S^{ro} M. prenis nature el niaj adresaroj). Sed ĉiu esperantisto konas nian karan lingvon kaj amas ĝin ; tial la ideo de S^{ro} M. montras aŭ lian bedaŭrindan naivecon aŭ kompatindan kredon je sia « Dilpok ».

Se S^{ro} M. sciis la aŭtoritaton de la scienculoj kiu aligis al nia afero kaj fariĝis fervoraj samideanoj, li certe ne citus sian « professeur catholique » kaj lian sensencaĵon.

Se S^{ro} M. estus vera ano de la granda ideo de lingvo internacia artefarita, li prenis en atenton, ke ĉiu nova sistemo kaj nova propagando kontraŭbatalanta la antaŭan nur malindigas en la societo tiun ĉi ideon. Li tute ne inkliniĝas imiti la ekzemplon de ŝatinda S^{ro} de Beaulront, kiu forlasis sian multjaran laboron kaj fervore aligis al nia afero. Eble opinias S^{ro} Marchand, ke lingvo universala disvolviĝas same kiel la komerco : per la konkurado de multaj komercistoj !

Tiel do : en siaj specimenoj de Esperanto kaj Dilpok S^{ro} M. falsas la tradukon (vidu la artikolon de S^{ro} B. Kotzin) ; citante leteron de sia anonima « profesoro », li videble kalkulas je la homa naiveco kaj neklereco (koncerne la esperantistojn li tre trompiĝas) ; kaj ĝenerale per sia propagando li faris tre suspektinda sian bonan volon por nia granda ideo de lingvo artefarita neŭtrale homa.

Tiujn ĉi klarigojn koncerne la proponinton de « Dilpok » mi kuraĝas aldoni al la rimarkoj de la estimata samideano S^{ro} Boris Kotzin.

D^{ro} Stefan DOBRZANSKI

P. S. — Sammaniere mi respondis al S^{ro} Marchand.

Laste aperintaj libroj

C. THIAUCOURT *Lasta parolado pri Esperanto* : o fr. 25.

H. SENTIS : *Urso*. — *En Montoj*. Originala prozaĵo kaj originalaj versaĵoj en Esperanto. 1 fr. 25.

S. L. *La novjara donaco de Ministro*, humoraĵo originale verkita en Esperanto. o fr. 50

GEORGE LEDGER : *Pitman's phonography adapted to Esperanto*. Angla alfabeto de Pitman'a stenografio al Esperanto. 1 fr. 35.

La Evangelio laŭ Sankta Mateo, laŭ D^{ro} MARTIN LUTHER, tradukita de W. B. MIELCK kaj FR. STEPHAN. o fr. 75.

Kondukanto al belega Skotlando, o fr. 20.

Kelkaj vortoj de la Redaktoro

Mi ne volas forstreki el la suba nomareto la nomon de S^{ro} WILLIAM MANN, ne donante al li tie ĉi publikan dankon kaj bedaŭron. Du jaroj da konstanta kunlaborado estas jam tempo sufiĉe longa por ke formiĝu fortikaj amikaj ligiloj kiam la kunlaborantoj estas — kiel li kaj mi — du fervoregaj Esperantistoj. William Mann estis por mi tre ŝatinda helpanto tiel en la gazetaĵaj aferoj, kiel en la ceteraj aferoj de la P. E. S., kaj precipe pri la Granda Vortaro. Certe lia foriro lasis al mi taskon ankoraŭ pli multepezan ol estis jam antaŭe. Li mem ankaŭ bedaŭris tiun disiĝon, sed li ne povis pli longe restadi en Parizo, kaj devis reiri Anglujon. Ni esperu, ke la legantoj de L. I. ne por ĉiam perdis sian komplezeman sekretarion!

Mi uzas tiun okazon por peti pardonon de niaj legantoj pri la diversaj prokrastoj de niaj eldonaĵoj (precipe de la Granda Vortaro) kaj neapero en la lastaj numeroj de L. I. de kutimaj rubrikoj. La malesto en nia Presejo (de 6 monatoj) de bona maŝinkompostisto bone scianta Esperanton, la foriro de S^{ro} Mann, la ĝenerala pariza strikado, kaj, fine, unu malsano mia, nebligis preskaŭ absolute pli akuratan laboradon. Feliĉe nun granda parto de tiuj malhelpaĵoj esta for, kaj ni povas fine esperi, ke ĉia malakurataĵo ne okazos plu. Mi kore dankas ĉiujn samideanojn kiuj pacience toleris tion, kaj certigas, ke ili ne pentos sian toleradon!

Paul FRUICIER.

Aperis nova kolego, *Idealo*, monata esperantista revuo, organo de la « Sicilia Federacio Esperantista » kaj de l'internacia societo « La Fasko ». Direktoro: D^{ro} Vitangelo Nalli, Corso Calatafimi, 495, Palermo, Sicilio. Jara abono: en Italujo, 2 frankoj; ekster Italujo, 3 frankoj. — Koran bondeziron al nia kunfrato.

Presejo de la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris

Administrantaro Th. Cart, prezidanto; Paul Fruictier, Ch. Vêrax, deleg.;
P^{ro} Benoit, D^{ro} Vallienne, membroj.

Sekretario de l'adm. V. Chaussegros. **Teknika direktoro:** Lengyel Pál.

L'Imprimeur-gérant: P. Fruictier.

ADRESARO DE KOMERCISTOJ

akceptantaj uzadon de Esperanto.

AVIZO. — La unua enpresio estas senpaga; ĉiu nova enpresio kostas 50 centimojn, dekdu presoj = 5 frankojn; por niaj abonantoj: 12 presoj 2 frankojn.

Paris, 33, rue Lacépède, — *Presa Esperantista Societo*, entreprenas la faradon de ĉiuspecaj presadoj.

Hódság (Bács-megye), Hungarujo, — S-ro *Molnár Gyula*, deziras interŝanĝi kolektojn da papilioj kun loĝantoj de tropikaj landoj; interŝanĝas ankaŭ elŝtopitajn (remburitajn) birdojn.

Valence d'Agen (France), — *Alfred Gérin*, posedanto de vinberejoj. Bonaj vinoj familiaj naturaĵoj. Prezaro kaj specimenoj afrankite laŭ peto.

Paris, IV-e, 17, rue du Temple, — *Fernand Blangarin*, reprezentanto por vinoj. Bonegaj vinoj el Bordeaux, Beaune, Madeira, Malaga, O Porto. — Rumoj. — Peti prezaron kaj specimenojn. — Forta rabato por Esperantistoj.

Glasgow, 137, West Regent Street, — *Tabaka Sindikato Esperantista*. — Specialaĵo: « CIGAREDO ESPERANTO ». — Telegrafa adreso « Verdastelo, Glasgow ».

Barcelono (Hispanujo), Puerta-Ferrisa, 30. — *Johano Rosals*, librovendisto. Vendado de Esperantaj verkoj. Specialaĵo en libroj kaj utilaĵoj por lernejoj.

Paris, *Hotelo de l'Orysthène*, 30, rue de Vaugirard, kontraŭ Palaco de l'Senato. — Moderaj prezoj. Loĝejo rekomendata al multaj Esperantistoj.

Al *matematiko, deskriptivo* (ev. eĉ *fiziko*) estos dediĉita « *Rondiranto* », kiu estas ĵus en formado. La interesantoj turnu sin al: **Bouška Hynek**, Praha-Smichov — 1097, *Bohemujo-Aŭstrio*.

HELSINGFORS, Finnlando, *Martin & Mäkelä*, librejo (adr. : It. Wiertotie 6, Felef, 5434, rekomendas sin al la finlandaj Esperantistoj.

Heinrich Kägi, Lehrer (instruisto), Bauma, Zürich (Svisujo) deziras korespondi kun kolegoj aŭ koleginoj.

S-ro J. A. WOODHEAD, Newport House, Headingley, Leeds (Anglujo), deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun gesamideanoj.

A. V. Aleksandrov, Jalta, Ruslando, deziras korespondadi per leteroj aŭ ilustr. poŝtk., kun neeŭropaj geesperantistoj.

Gazetoj Esperantistaj

L'Espérantiste, oficiala revuo de la Societo franca por la propagando de Esperanto, 24 paĝoj (formato 15 x 20) da teksto franco-Esperanta aŭ nur Esperanta, 8 paĝoj kovrilaj (nomaroj de Esperantaj verkoj kaj de ĉiuj grupoj de la S. f. p. E.) ; *Internacia Korespondado Esperanta* senpage disponebla por la abonantoj — 3 fr. 50. *Jarabono* (1-a de januaro, aprilo, julio, oktobro) en *Francujo* : 3 fr, *ekster Francujo* : 3 fr. 50 ; kun enskribo en la francan Societôn 4 fr. ĉie. — Adreso de l' administracio *Louviers* (Eure) France.

Espero Katolika, 32-paĝa revuo monata tute en Esperanto, malfermata por ĉiuj. Rakontoj, artikoloj pri nuntempaj aferoj, ŝakoj, k. c. *Jare* : 5 fr. (en *Franclando* 4 fr.) Presejo A. BARBOT, 15, rue Etienne Pallu, *Tours* (France).

Espero Pacifista, monata organo de l'*Internacia Societo Esperantista por la Paco* (krom avizo kontraŭa, la abonintoj estas enskribitaj kiel aliĝantoj al la Societo). — Jara abono (aŭ minimuma kotizo) : 5 frankoj. La Societo akceptas ankaŭ opajn aliĝojn. — Sin turni al S-ro GASTON MOCH, 26, rue de Chartres, *Neuilly-sur-Seine* (France).

Germana Esperantisto, organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj. Eliras 12 fojojn jare. Redaktata germane kaj esperante. Jara abono 4 frankoj. Administracio kaj Redakcio *Esperanto Verlag*; MÖLLER & BOREL, *Berlin*, S., 95, *Prinzenstrasse*.

The British Esperantist, oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio ; 12 paĝoj da novaĵoj k. c. anglo-Esperante, kaj 8 paĝoj da Aldono tute en Esperanto. *Jare* 4 fr. (sen Aldono, 2 fr.). — Oni abonas ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13 *Arundel Street*, *Strand*, *London*.

Tra la Mondo, tutmonda multilustrata revuo monata, tute en Esperanto. — Nuntempaĵoj, Pri Esperanto, Arto kaj Literaturo, Sciencoj, Komercio kaj Industrio, Militistaro, Maristaro, Teatró, Sportoj, Virina kaj Gejunula paĝo, Felietono, Konkursoj kun valoraj monaj premioj. — Ĉiuj artikoloj estas verkitaj de anoj de l'landoj aludataj. — *Jare* 8 frankoj ; kvaronjare, 2 fr. 25. — Redakcio : S-ro MONTROSIER, 8bis, rue de l'Ecu d'Or, *Orléans* ; Administracio : 15, *Boulevard des deux Gares*, *Meudon* (S.-et-O.) France.

La Belga Sonorilo, organo de la Belga Ligo Esperantista. Eliras 12 fojojn jare. Redaktata france, flandre kaj esperante. Jara abono : 4 frankoj. — Redaktoro-administranto, al kiu oni ĉion sendu : J. COOX, *Duffel*, *Belgique*.

Internacia Revuo Medicina, monata organo por praktika medicino, redaktata en Esperanto kaj diversaj lingvoj naciaj, de diverslandaj kuracistoj. Celas ne nur la Esperantan, sed ankaŭ la kuracistan utilon. Jara abono : 7 fr. (en Franc-lando 6 frankoj. PARIS, 33, rue Lacépède.

Esperanta Ligilo, ĉiumonata revuo, TH. CART, ĉef-redaktoro, 12, rue Soufflot, Paris V. — Abonkosto : 3 fr. jare. Dua jaro (1905), n-ro 5—6 (septembro-novembro).

Esperanto, scienca kaj literatura ilustrita monata revuo. En la lingvoj Esperanta kaj hungara.

La jaran abonpagon (4 fr.) sendu al la redaktoro MARICH ÁGOSTON, Papnövelde-utcza 6, Budapest, IV, (Hungarujo).

Ruslanda Esperantisto, ĉiumonata organo de la Societo « Espero » en Esperanto kaj parte en rusa lingvo. — Diversspeca, interesa kaj bonstila literatura materialo : artikoloj pri la problemoj de lingvo internacia kaj pri Esperanto ; vasta kroniko de Esperantista movado (propraj korespondantoj) kaj bibliografio ; social-politika fakoj ; novaj famaj beletristikaĵoj interalie en 1906 j. estas presata la « Ruĝa Rido » de L. Andrejev), versaĵoj kaj multaj aliaj. — La detalaj prospektoj estas riceveblaj senpage. — Adreso : Ruslando, St.-Peterburgo, B. Podjačeskaja, 24, la Societo « Espero ». — La jara abonpago (kune kun membriĝo en la Societon) 3 rubloj (7 fr. 50).

Juna Esperantisto, ilustrata gazeto por junuloj, instruistoj kaj Esperanto-lernantoj. Eliras monate. Literaturaĵoj, teatraĵoj, karikaturaj. Jara abono : 2 fr. 50. Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

Juan Rozals, Puerta-Ferrisa 30, Barcelona (Hispanujo), deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn kun ĉiulandaj geesperantistoj. Krom tio li deziras korespondadi kun kolektistoj de mineralaĵoj, elfosataĵoj, aŭ vivantaj konkoj kaj helikoj, por interŝanĝi ekzemplerojn.

GUSTAV SCHWENGELER, Hegi (Zürich), Schweiz. — Rekomendas sin kiel citra instruisto. Instruado laŭ normala kaj viena metodo. Studado de kantoj kaj aranĝoj de koncertoj. Programo da 700 numeroj. Gaja kaj serioza muziko. Atestoj al servoj.

Oni deziras aĉeti jenajn numerojn de gazetoj :

Lingvo Internacia : 85 (Jan. 1903). — 95 (Nov. 1903). — 97 (Jan. 1904).

La Lumo : 1903. — n-rojn 4 — 7 — 8 — 9 — 10. etc. ĝis laste eldonita.

Sin turni al **Librejo L. Lamiot**, Céret, P.-O., France.

S-ro LOUIS PÉRIARD, *Auxerre* (Yonne) Francujo, deziras korespondi kun geesperantistoj, precipe fremdaj, per ilustritaj poŝtkartoj aŭ leteroj.

Kuracado per Esperanto

S-ro **Oberlehrer Geil** el *Worms*, Germanujo sciiginte pri *Viksolo* per anoncoj de la esperantaj ŝlosiloj skribis al ni :

« Mia edzino suferas per Astmo de 4 jaroj. La atakoj estas periodaj kaj de sufoka naturo tiel terura, ke la anima premiĝo ŝin ofte igas deziri la morton.

Si perdis de sia suferado 20 funtojn da korpopezo kaj la kuraciloj ĝis nun uzataj estinte senutilaj, mi petas vin sendi la Viksolilaron laŭ viaj kondiĉoj nome :

Senpaga trisemajna provo. Pago de la honorario, se mia edzino resaniĝos. Resendo de la ilaro, se *Viksolo* malsukcesos. »

S-rino **Oberlehrer Geil** raportas :

La trisemajna provo finiĝis kaj mi pagis hodiaŭ aŭ via banko vian honorarion.

... Astmo ne plu estas al mi la iama teruraĵo.

De la aplikado de *Vikzolo* ĝi estas malaperinta kaj jam ajn ĝi minacas ree aperigi, sufiĉas kelkaj enspiradoj por tuj formovi la timigan spiradan malhelpon.

La faciligo komence ne venis tuj. Mi jam ektimis, ke mi malsukcesus.

Tamen kiam al mi prosperis profunde enspiri kaj la atomigilo donis grandan nubon da *Vikzol-vaporoj* revenantan tra la buŝo, tiam la mukaĵo amase liberiĝis kaj de tiu tempo mi ree povas facile spiradi.

Mi tion ĉi konstatas kun granda ĝojo kaj dankemo kaj mi permesas al vi uzi tiun ĉi ateston, kie ajn vi ĝin juĝas esti utila.

Esperantistoj konantaj astmulojn, kiuj eble estas ruinigitaj sian sanon per la kutima uzo de la tiel nomataj astmaj pulvoroj, estas kore petataj sendi al ni iliajn adresojn, por ke ni sciigu ilin pri nia rimedo gasoforma en poŝto kun si portebla. kiu jam redonis la sanon al

pli ol 1500 astmuloj.

Por ĉiuj 6 adresoj alsendotaj ni donacos duonjarabonon de la *Brita Esperantisto*.

Skribu Esperante al -

The Vixol Syndicate

304, Brixton Hill, LONDON S. W.

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO, 33, RUE LACÉPÈDE, PARIS

